

N. N. 57,

## Fratoj, al festeno bona Dio

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Fratoj, al festeno bona Dio  
 Kunvenigis nin en kanta ĥor',  
 Ĉiun zorgon tuj per energio  
 Ni kuntrinkantuloj ĉasu for!  
 |: Kie ŝaŭmas vin', val-le-ral-la!  
 Ĝoj' florigas nin, val-le-ral-la!  
 Kiel de l' printemp bela flor'.:|

2. Gaje ni traĝoju la junecon  
 Kun amikoj bonaj en kunven',  
 Ili donu al ni kontentecon,  
 Kaj la vino estu kora ben'!  
 |: Per vinbara fort', val-le-ral-la!  
 Kontraŭ iu sort', val-le-ral-la!  
 Ni jen armigitaj de deven':|

3. Ne trinketu nur el la pokalo,  
 Kiam plena estas la barel',  
 Kiu ĝuas vivon gute en tervalo,  
 Ne konscias pri vivada cel'!  
 |: Vagle trinku do! val-le-ral-la!  
 Malplenigu, ho! val-le-ral-la!  
 Plua pleno kuŝas en la kel'!:|

...

4. Kun lumanta sento la junulo  
 Bonkuraĝe vagas tra vivad',  
 Kaj kun amikeco de kunulo  
 Li turnadas laŭ destina rad'.  
 |: Vi do fidu min! val-le-ral-la!  
 Ĝis de l' mondo fin', val-le-ral-la!  
 Estos mi fidela kamarad':|

5. Ne sen uz' pasigu la junecon,  
 El pokalo, laŭ konata fam',  
 Vi elĉerpos veran la belecon:  
 Ĉe knabina brusto kora am'!  
 |: Kiam lasos nin, val-le-ral-la!  
 La junec' kaj vin', val-le-ral-la!  
 Nin akceptu, Ĥaron, via pram':|

*Traduko de la Germana poemo "Brüder, zu den festlichen Gelagen" de N. N. 57 en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-02-16 – †1919).*

*Arg-833-1673 (2013-02-20 17:33:26)*

*Tradukita de Ludwig Emil Meier (16.02.1847 - 1919 ). Tiu ĉi traduko aperis en 1907 en la kant-libro „Esperantista Kantaro“, eldonita de la Esperanta Eldonejo Hans Theodor Hoffmann en Berlino. Pri la tradukinto Ludwig Emil Meier rigardu la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier).*